AŬSTRIA

ESPERANTO-REVUO

Oficiala organo de la aŭstria Esperanto-movado
Offizielles Organ der österreichischen Esperanto-Bewegung

Aperas monate

Redakcio kaj administracio: Vieno XV, Fünfhausgasse 16, Austrio. — Telefono R 33-3-64

7-a jaro | JULIO/AUGUSTO 1952 | n-ro 7/8

LA MONUMENTO EN WÖRGL

Nun ĝi staras, el granito
Kun la busto el marmoro.
Forta ŝton', simbol' de spito,
Firma danko al fervoro.

Ĝin neniu vent' ŝancelos,
Kia ajn albruos ronde.
L' elementoj ĝin alcelos -
Ĉiuj dissplitiĝos honte.

Tamen, kion ĝi prezentas,
Estas memoriga bildo
Pri heroo, kiu sentas
Por homar' el kora mildo.

Lia verko helpamane,
Frate gvide, nin kuniru.
Por ke l' homanim' ne vane
Al Konkordo plu sopiru.

Noblas lia verk' marmore
Kaj solidas ĝi granite.
Varme molas ĝi homkore:
Pacbatale, Di-benite.

Nin egidu, monumento
Zamenhofa en Tirolo.
Por ke venku Nova Sento
En la mond' kaj Bona Volo!

H. Kraus

Inaúguro de la unua Zamenhof-monumento de Aústrio en Wörgl, Tirolo

La persistaj kaj celkonsciaj preparlaboroj de la komitato por la Zamenhof - monumento - prezidanto s -ano Hans S t e i n e r , vicprezidanto s-ro urbestro komerc-konsilisto Martin P i c h l e r kaj kasistino s-anino Therese K a i n e r , akcelata de la komitata honor= prezidanto, s-ano kortega konsilisto Hugo S t e i n e r havis plenan sukceson.

Favorata de sunbrila vetero, estis la inaúgura so= lenaĵo granda manifestacio por la memoro de unu el la plej grandaj amikoj de la homaro , de la kreinto de la internacia lingvo Esperanto, de nia Majstro d-ro L. L. Zamenhof.

Jam sabate, la 26an de julio alvenis el ĉiuj lig= landoj kaj el 9 aliaj landoj gesamideanoj al Wörgl , la plej juna urbo de Aústrio , por ĉeesti nian feston . Pli ol mil ges-anoj kaj gastoj ĉeestis posttagmeze la kon= certon , prezentitan de la loka kapelo de la najbara urbo Kundl, sur la placo antaú la stacidomo. Flagoj de la landoj de niaj gastoj ornamis la belan stacidoman urbo= placon. La poste okazinta Tirola Vespero , kiun gvidis s-anino fakinstruistino Herma Haselsteiner, estis plena suk= ceso de la lokaj kunludintoj, kiuj prezentis tirolajn dan= cojn, kantojn kaj muzikaĵojn. Ĉiu programnumero estis ĉar= me prezentata kaj rikoltis fortan, meritan aplaúdon.

Dimanĉe antaú la 9a h kunvenis la gastoj kaj s-anoj antaú la paroĥa preĝejo. Baldaú la preĝeja placo estis plena je festanta publiko. La domoj de la placo, same tiuj de la ceteraj stratoj estis ornamitaj per la aústriaj kaj tirolaj standardoj kaj plialtigis la festan agordon, kiu regis en la urbeto.

Post akcepto de s-ro viclandestro M a i r , kiu transprenis la taskon de la inaúgura ceremonio anstataú s-ro federacia kanceliero d-ro inĝeniero Figl, kiu malsana kuŝis en la hospitalo , s-ro abato prelato T r i n d l celebris la katolikan pontifikan meson. Ni auskultis la edifan, E-lingvan predikon de la al ni aústriaj E-istoj bone konata P. kaplano T h a l m a i e r el München.

Knabina ĥoro kantis E-lingve la faman Schubert-meson kaj ĉiuj ges-anoj kantis kune.

Post la meso la festanoj kolektis sin antaŭ la preĝ=ejo kaj fervojista orkestro kondukis ilin al la stacidoma placo,kie jam multnombra publiko atendis la E-istojn kun iliaj honorgastoj.

Precize je la 10.30 h komenciĝis la solenaĵo, dis=aŭdigata de Radio-Innsbruck, per saluta alparolo de la komitata honorprezidanto , s-ano kortega konsilisto Hugo S t e i n e r . Li skizis la estiĝon de la monumento kaj esprimis al ĉiuj akcelintoj de la projekto la dankon de la komitato kaj, plue, de la tuta E-istaro . Finante li laŭtlegis la salutan leteron de s-ro federacia kanceliero, kiu estis transpreninta la egidon de la monumento . Li legis ankaŭ leterojn de pluraj aŭtoritatuloj.

La iniciatinto de la monumento kaj senlaca organiz=into de la preparlaboroj, s-ano H a n s S t e i n e r , kore bonvenigis la alvenintojn kaj esprimis sian ĝojon pri la sukcesa efektiviĝo de sia plano kaj dankis al ĉiuj siaj helpintoj kaj subtenintoj,speciale al la komprenema s-ro urbestro , komerckonsilisto Martin P i c h l e r, kiu lin ĉiel subtenis.Li dankis ankaŭ al s-ano kort.kons. Steiner,kiu grave helpis per intervenoj ĉe la autoritatoj.

La senvualigon de la blankmarmora busto de mia Majstro faris s-ro viclandestro Mair. Ĝi estis kovrita per la E=flago . S-ro viclandestro akcentis en sia alparolado la gravecon de la lingvo Esperanto kaj honoris ĝian aŭtoron, al kiu la dankema E-istaro kaj multaj simpatiantoj de la ideo pri internacia lingvo dediĉis tiun monumenton.

Post subskribo kaj enmurigo de la inaŭgura dokumento la urbestro de Wörgl transprenis la monumenton sub la pro=tekton de la urbo , dankante al la komitato pro distingo de la urbo per la unua monumento tia en nie ŝtato.

S-ano Theodor O h n e s o r g e ,la artista skulp=tisto, esprimis sian ĝojon,ke li povis dediĉi sian kapab=lon al la honorado de unu el la plej eminentaj amikoj de la homaro.

Kantado de la E-Himno kaj deklamo de festpoemo,ver=kita de s-ano d-ro F r i e d l , Graz, estis sekvataj de alparoloj de la reprezentanto de la franca okupacia aŭ=toritato , s-ro P r o v o t , de ministro e.s. d-ro

F r e n z e l , kiu kiel prezidanto de AEF esprimis la salutojn de la aústria E-istaro kun gratulo pro la suk=cesa starigo de la monumento. Al la urbo Wörgl kaj al la artisto li dankis kaj atentigis pri la neceso de komuna, neútrala lingvo por unueca Eúropo.

Nome de la tutmonda E-istaro s-ano redaktoro Hans J a k o b , estrarano de UEA, akcentis, ke li estas for=te impresita pri la modela aranĝo de la solenaĵo kaj la bela verko. Ankaúli esprimis dankon , tiun de la centra E-organizo. Por la eksterlandaj reprezentantoj parolis la ges-anoj Daris (Belgio), Lunzer (Egiptio),Lati (Fran=cio) d-rino Leubner (Germanio), prof. Campeti (Italio), Plesier (Nederlando),Walder (Svisio) kaj Rosê (Triesto).

P. kaplano Thalmaier faris germanlingvan festparol=adon, glorante en ĝi nian Majstron kaj ĝian uni-kan ver=koñ, dediĉitan de li al la tuthomaro, servanta al la in=terpopola kompreno kaj celanta al fina vera paco.

La inaúgura solenaĵo finiĝis per kantado de la E-himno , prezentita de la knabina ĥoro de s-ino Hasel=steiner kaj akompanita de la muzikistaro fervojista.

Festa tagmanĝo kunigis la aranĝintojn kaj la re=prezentintojn de la landaj kaj lokaj aútoritatoj. Ĝin sekvis fotografado antaú la monumento.

Posttagmeze la plej granda parto de la festanoj fa=ris en tri aŭtobusoj rondvojaĝon ĉirkaú la proksima pi=toreska Kaiser-montaro , aliaj partoprenintoj faris eks=kursetojn al la apudaj alpoj.

La vespero kunigis ree la ges-anojn por dancaranĝo, kiu estis nur interrompata per starfilmo pri la Inter=nacia E-Muzeo en Vieno.La klarigajn vortojn parolis s-ano kort. kons. Steiner, direktoro de la muzeo.

La ĉeestintaj s-anoj AEF-landestroj dume kunvenis por priparoli kun la afergvidanto de la federacio, s-ano ofickonsilisto C e c h , plurajn urĝajn aferojn de la tutlanda organizo.

Estu esprimata al la multmerita monumenta komitato nia sincera danko pri la tuta aranĝo kaj nia kora gratu=lo pri la grandioza sukceso de ĝia pena klopodado ! La efiko de ĝia entrepreno estas eminenta. La gazetaro kaj la radio-disaúdigoj kaj la soleno mem atentigis vastan publikon pri nia movado. Kaj la monumento de nia Majstro mem estos daúra memoriganto pri lia verko. R.Cech.

La devizo de nia jarkunveno: konkorda kunlaboro!

La 7an kaj 8an de junio kuniĝis en Vieno la delegi=toj de AEF el preskaŭ ĉiuj federaciaj landoj de Aústrio por raporte prezenti sian aktivadon kaj diskuti la agad=on de la centra estraro en la pasinta periodo de 1951/52. Ekzistis pesimistoj inter ni, kiuj profetis bruigan jar=kunvenon pro antaŭe esprimita malkontento de kelkaj gru=poj kaj izolaj membroj. Tamen pravis la optimistoj , ĉar la ĉefkunveno pasis en plena harmonio,kvankam kelkaj de=legitoj kritikis diversajn punktojn el la agraporto de la estraro.

La prezidanto de la ĝenerala kunveno , magistrata ĉefkonsilisto d-ro Grimme , povis krom la plimulto el la AEF-landestroj ankaŭ saluti la direktoron de la Interna=cia E-Muzeo, kort. konsil. Hugo Steiner, kaj kiel gaston s-anon Kries el Zaandam, Nederlando , kiu siavice trans=donis al la jarkunveno la salutojn de la nederlandaj ge=samideanoj. Kun speciala danko al komandoro P. Plank la kunven-prezidanto menciis ties E-predikon en la katolika Di-servo, kiu, partoprenate de cento da E-istoj , okazis antaŭ la komenco de la jarkunveno.

Afergvidanta vicprezidanto ofickonsilisto R. Cech antaŭ la agraporto funebre memoris la ges-anojn , kiujn rabis la morto el niaj vicoj . La delegitoj starante ho=noris ilian memoron . Kvankam la raporto ne povis elmon=tri gravegajn sukcesojn, ĝi tamen sumigis multegan deta=lan laboron, faritan dum la agperiodo . Diversaj miskom=prenoj de pluraj grupoj povis esti klarigitaj al la E-landestroj kaj delegitoj en la interparoladoj la 7an de junio posttagmeze.

En la raportoj de la AEF-landestroj respeguliĝis la nuntempe malfacila laboro por nia kulturideo , kiun kondiĉas la specialaj cirkonstancoj en Aústrio kiel an=koraŭ nun okupata lando . La anoj de la jarkunveno dank=is al ili pro la tamen persista laboro. Sed la aplaŭdo kulminis kiam la iniciatinto de la unua Zamenhof-monu=mento de Aústrio en Wörgl , AEF-landestro de Tirolo-Vor=arlberg, Hans Steiner , faris sian raporton pri la pen=iga agado por la inaŭgurota monumento. El tiu ĉi aplaŭdo sonis la danko de ĉiuj geesperantistoj pri la aktiveco de s-ano Hans Steiner.

Kun granda bedaúro konstatis la jarkunveno, ke kel= kaj grupoj pro miskompreno de la vera situacio opiniis motivita eksiĝon el la federacio . Doktoro Grimme solene deklaris,ke al ili la pordo al AEF restas malfermita kaj la landestroj promesis al la kunvenanoj , ke ili zorgos por regajni ilin por la komuna organizo.

La kasraporto,kiu al ćiuj delegitoj estis skribe en= manigata,montris la egan barakton de la organizo kontraú la problemaro de la spezo,kaúzita per la altaj prezoj de la ekzistorimedoj , kiu ankaú ne haltas antaú la admini= strado de organizoj.Objekto de la plej granda zorgo est= as la altaj eldonkostoj de la AERevuo,kvankam ĝi nur po= vas aperi dumonate, kio elvokas la daúran kritikon de la anaro.AEF certe volonte eldonus monatan kaj presitan or= ganon, sed la malaltaj kotizoj al la Centro kaj la altaj paper= kaj preskostoj bedaúrinde ne permesas tion.

Kvankam la altaj prezoj kondiĉus plialtigon ĝenera= lan de la membrokotizoj,la jarkunveno tamen decidis kon= servi la nunan kotizon al la Centro de S 1.50 kiel mini= mumkotizon, sed ćiuj finance pli bonstataj anoj bonvolu pagi monate S 2.50

La baloto pri la nova AEF-estraro rezultigis,ke oni denove konfidis la gvidadon de la federacio al la ĝisnuna estraro, escepte de du šanĝoj.

Proponoj de d-ro Halbedl pri enkonduko de E. en la lernejojn kaj pri eldono de nova E-poŝtmarko kun alpago profite al la E-movado estis akceptataj. Same rezolucio de d-ro Halbedl , en kiu estas refutata la kalumnio, ke AEF estas kaŝita komunista organizo , kio estis asertata en artikoloj , aperintaj en la jurnaloj "Orientierung" (Zürich)kaj aliaj,lastatempe en "Die Quelle" (Feldkirch).

Entute la ĝenerala kunveno faris fruktodonan laboron, klarigis diversajn miskomprenojn kaj fortigis en ĉiuj delegitoj la konvinkon , ke per la malmultaj rimedoj en la tuta organizo estas farata de ĉiuj funkciuloj, kaj en Vieno kaj en la federaciaj landoj , ćio ebla por la bono de la movado. Kaj kompreno pri la situacio, harmonio kaj amikeco regis dum la ĉefkunveno inter ĉiuj.Tiu ći konkor= do en la movado estu bona kaj esperiga signo por nia ko= muna estonta laboro !

A.B.

Atentindaĵoj el la ĝeneralkunveno.

La ĝeneralkunvenon ĉeestis pli ol 130 personoj, inter ili la AEF-landestroj prof.Hans Bauer, Johann Schwarz, Karl Nigl , Hans Steiner kaj Emil Vokal; Salzburg estis reprezentata de s-ano Reiter (AKLE-grupo). Ekster-Vienaj grupoj estis reprezentataj de oficsekretario Gebert (Linz), a-ano Stöckl (Innsbruck, Hall i.T., Wattens), Hans Steiner (Wörgl) , Reiter (AKLE-Salzburg) , Balague (St. Pölten), Reithofer (Hainburg) , Patak (Felixdorf) , Schwarz (Wr. Neustadt), Ebner (Klosterneuburg) , Zuber (Knittelfeld). La delegitoj reprezentis entute 706 membrojn de AEF.

Senkulpigis sin per deĵora malhelpo kaj salutis la aranĝon niaj eminentaj samideanoj prezidanto ministro e.s. d-ro Frenzel , honorprezidanto sekcia ĉefo d-ro Dworschak kaj s-ano urbestro Franz Jonas.

Aparte la kunvenintaro aklamis al s-anino M a r i a L o i b e l , al kies idealismo la federacio ne nur dankas la bonan funkciadon de niaj kasaferoj , sed ankaŭ la centran gvidadon de multaj administraĵoj.

La kasraporto por la periodo inter 20.7.51 kaj 31.5. 1952 donas jenan bildon:

Stato 20.7.51:		S	2.540.94
kotizoj 1951	S 4863.30		
" 1952	" 4792.50	"	9.655.80
donacoj 1951	S 997.96		
" 1952	" 651.60	"	1.649.56
subvencio de instruministerio		"	1.000.--

ELSPEZOJ :

Luo, purigo, lumo, hejto, sen donacoj	S	3.443.29
telefono, transigo al 2a etaĝo	"	1.074.20
transporto de mebloj al la 2a etaĝo ktp.	"	432.90
anonco en adreslibro,Umsatzsteuer,veturoj	"	314.61
afranko, ekspedoj	"	713.20
skribmaterialo,papero, kancelariartikloj	"	769.74
kompensoj al kunlaborantoj VII/51-V/52	"	1.790.--

preso kaj paperkosto por 10.000 varbiloj		S	1.568.--
donaco por Z.-monumento kaj -valso		"	65.40
AERevuo, resto 1951	S 1239.89		
3 n-roj 1952	" 2261.78	"	3.501.67
saldo je 31.5.52		"	1.173.29
	S 14.846.30	S	14.846.30

Mono kontanta	S	49.01	
Postsparkasse	"	3.643.15	
kredita havaĵo		500.--	
	S	4.192.16	
minus ŝuldoj	"	3.018.87	
kapitalo	S	1.173.29	

Ŝuldoj al		
VED	S	188.92
Socialistoj	"	1.849.--
Instruistoj	"	960.95
"Distro"	"	10.--
Junularo,	Fr.	10.--
	S	3.018.87
kredita havo ĉe Ravag	"	500.--

Nombro de pagantaj membroj: 713

Koncerne la raportojn de ĉiuj fakoj de AEF oni permesu al ni nur mencii, ke ili donis mozaikan bildon pri la imensa laboro, farita de nia organizo por la afero de Esperanto en la agperiodo. Grandparte tiuj laboroj evidentiĝis jam el nia organo, bedaŭrinde la malgranda formato de AER ne ebligas laŭmeritan detaligon de ĉies penadoj kaj sukcesoj.

La elektoj rezultigis jenan estraron: Honora prezidanto - sekcia ĉefo d-ro Karl DWORSCHAK ; prezidanto - ministro e.s. d-ro Hans FRENZEL ; vicprez. - ministeria konsilisto d-ro Max FÜHRING , magistrata ĉefkonsilisto d-ro Leopold GRIMME,financoficisto Hans STEINER (Wörgl); afergvidanta vicprezidanto - ofickonsil . Rajmund CECH ; sekretario - urboficisto Alfred BERDAN ; kasistinoj - s-ino Maria LOIBEL, s-ino Jolanthe LESER. Kromaj estraranoj: prof. Hans BAUER (Eisenstadt),Karl DÜRRSCHMID (Karintio), Josef EDER (Graz) , dir. Paul GLÜXMANN, prof. d-ro Josef E. GÖRLICH, d-ro Adolf HALBEDL (Knittelfeld), P. d-ro Peter HOHENWARTER (Klagenfurt), urboficisto Hugo KRAUS, Gustav LOIBEL , Walter MUDRAK , Karl NIGL (Linz), Robert NOVACEK,Heinrich REITER (Salzburg),Martin STÖCKL (Innsbruck), Emil VOKAL , ministeria sekretario Ernst WERNER ; kontrolkomitato : Maria ZAJICEK , fakinstruisto

Franz JEITLER, Johann SCHWARZ (Felixdorf).

Post vigla diskutado estis akceptataj tri proponoj, ekzamenitaj de la proponkomitato: d-ro Halbedl prezentis proponojn pri eldonigo de speciala poŝtmarko kun alpago profite al nia movado kaj pri enkonduko de E-instruado en la lernejojn kiel lernenda fako. Dir. Glüxmann sugestis, ke ni klopodu, ricevi financan subtenon el la ŝtata kulturfonduso.

Pri la estonta agado referis s-ano Cech. Li skizis la plej urĝajn taskojn de la federacio kaj de la societoj: Ni zorgu por akiri la ankoraŭ ne aniĝintajn aŭstriajn E-istojn kaj kolektu persiste la eksmembrojn , kiuj en la lastaj jaroj forlasis niajn vicojn. Ni pliperfektigu nin en la lingvoscio kaj la arto interesigi la klubajn programojn. Ni fervorigu niajn geamikojn por aktiva partopreno al la propagando de nia lingvo kaj por ties praktika uzo. Ni laboru pli devokonscie por krei novajn kursojn kaj studrondojn kaj klopodu gajni terenon por nia lingvo en ankaŭ malgrandaj lokoj.Ni atentu la neseson pri konstanta kunlaboro inter la societoj, landestraroj kaj la Centro kaj ni kutimiĝu al ofta, konsekvenca raportado pri eĉ ŝajne malgravaj aferoj kaj atingoj,ĉar la regulaj raportoj tutigas la objektivan bildon pri la stato de la movado.- Laŭ propono de s-ano Cech la kunvenanoj konsentis la sendadon de salutleteroj al eminentaj subtenantoj de nia afero: al la ŝtatprezidanto,federacia kanceliero, urbestro de Vieno k.a.

S-ano Nigl invitis al komuna vojaĝo al la 38a Universala Kongreso de Esperanto en Zagreb, Jugoslavio. Majoro Sinner instigis, ke ni aktive partoprenu diskutarangojn favore al E.en diverstendencaj kulturorganizoj.

S-ano kort. kons.Hugo Steiner invitis al partopreno de la festkunsido okaze de la 25jar-jubileo de la Internacia E-Muzeo, kiu okazos la 17.8.52. Li informis ankaŭ, la muzeo ricevos 5an salonon. S-ro Steiner instalos "konstantan E-ekspozicion", 24 vitrinoj estos starigataj por plimultigi la ekspoziciaĵojn. En aŭtuno estos eble al E-istoj en kaj ekster Vieno legi kaj pruntepreni librojn (en kazo de sendo, je kostopago) . La fondinto-direktoro de nia unika E-institucio rikoltis kolosan aplaŭdon pro sia alparolo.

S-ano d-ro Grimme, fermante la jarkunvenon 1952 , esprimis dankon pro la konkorda traktado de la diversaj problemoj de nia federacio kaj pro la persista intereso por nia movado . Li ripetis sian peton pri plua kaj harmonia kunlaboro kaj celkonscia agado en la organismo de la federacio kun regula kontaktado kun la E-Centro.

Poste okazis la anoncita vizito de la nova Aústria Esperanto-Centro , Vieno 15., Fünfhausgasse 16. La nova ejaro , belaspekta kaj moderna , la koro de nia movado, pretas kun siaj fidelaj laborantoj por pumpe cirkuligi la sangon , produktatan de la ceteraj organismeroj , por ke vivu kaj plivigliĝu la movado sur la teritorio de Aústrio. Ĝi plaĉis al ĉiuj.

INFORMOJ DE LA ESPERANTO-CENTRO

AEF-Centro en nova hejmo. Vendrede, 13.6. nunjare, nia E-Centro kaj libroeldonejo kaj -vendejo "Tramondo " transiĝis en la novkonstruitan loĝdomon de la urbo Vieno, 15a distrikto, Fünfhausgasse 16 . Tiu strato situas nur kelkajn ir-minutojn proksime de la Okcidenta Staci = domo kaj estas atingebla per la tramoj de Mariahilfer = strato , dua stacio de Gürtel . Nia Centro konsistas el vendejo kun eniro de la strato, el kancelario, bela kunvenejo kaj malgranda deponejo. La ekipaĵoj faras modernan, agrablan impreson . Oni konstatas , ke aktivis tie homoj, kiuj ne nur spirite , sed ankaŭ kore estas ĉe la afero. La nova telefonnumero: R 33-3-64.

La translokadon aranĝis nia s-anino Maria Loibel , al kiu la AEF-estraro nome de la aústria samideanaro direktas sian sinceran dankon . Meritas nian dankon kaj nian altestimon pro sia malfanfarona kunlaboro la ges - anoj Inge Michalicka, Hugo Braun, Decker, Gustav Loibel, Ohrenberger, Pistorius kaj Hermann Schalk. Per ofta vizito de la kunvenoj kaj regula ĉeesto al la kunsidoj ni rekompencu la sindonemon de niaj geamikoj !

LA ESTRARO DE AEF.

AÙSTRIA ESPERANTO-KONGRESO 1953 EN KLAGENFURT.

La 26.6.okazis en la karintia ĉefurbo kunsido , kiu estis kunvokata de nia AEF-landestro s-ano Dürrschmid . Ĝin partoprenis la s-anoj lernejdirektoro Schmid , Otto

Müller , Dürrschmid juna kaj nia afergvidanta vicprezi = danto Cech. S-ano P. M. Pius telefone estis informata pri la traktaĵoj. Post ricevitaj detalinformoj kaj konsider= ante, ke la 38a Universala Kongreso de E. 1952 estos ar= anĝata en Zagreb , la kunvenintoj decidis inviti la 6an Aústrian E-Kongreson 1953 al Klagenfurt . Samtempe okazu tie "Internacia Esperantista Renkonto" antaúkongresa por ebligi al la multaj traveturontaj eksterlandaj ges- anoj ekkoni la belan karintian ĉefurbon , ĝian lago - kaj ka= steloriĉan ĉirkaúaĵon. Detaloj sekvos. R.C.

Esperanto-radiointervjuo. Okaze de la solena inaú = guro de la Zamenhof-monumento en Wörgl aranĝis la prezi= danto de AEF , s-ro ministro e.S. d-ro inĝ. H. F r e n = z e l kune kun s-ano ofickonsilisto C e c h radioin = tervjuon , kiu estis aúdigata en "Eĥo de l'tago" , ĵaúde la 24.7. La intervjuo celis atentigi la publikon pri la inaúguro de la monumento kaj pri la vizito de redaktoro Hans J a k o b , estrarano de UEA, en Vieno.

Der neue Mitgliedsbeitrag. Auf Beschluss der Jahres= hauptversammlung am 8.6.52 in Wien wird der monatliche Mitgliedsbeitrag an die Verbandszentrale in zwei Beitrags= stufen ab 1. Juli 1952 eingehoben und zwar :

Beitrag A (Mindestbeitrag): monatlich S 1.50 Diesen Beitrag zahlen alle finanziell schwächeren Mitglieder.

Beitrag B: monatlich S 2.50. Diesen Beitrag sollen alle finanziell leistungsfähigeren Mitglieder ab 1.7.52 bezahlen.

Die Gruppenkassiere werden ersucht , ab 1.7.52 die Mitgliedsbeiträge nach diesen beiden Beitragsstufen ein= zuheben und an die Verbandszentrale ehestens abzuführen. In den Abrechnungslisten sind die Mitglieder getrennt nach Beitrag A und B anzuführen. Beitragsmarken sind von der Zentrale zu verlangen.

Wie aus dem Kassenbericht hervorgeht verursacht die Herausgabe der Revuo dem Verbande die größten Kosten. Es können daher nur jene Gruppen und Einzelmitglieder be= liefert werden, welche ihre Mitgliedsbeiträge regelmäßig und in voller Höhe an den Verband übermitteln.

Esperantosteloj en la E-Centro riceveblaj.Post lon= gaj klopodoj la E-Centro sukcesis disponigi al nia membr= aro belajn E-stelojn el emajlo, je la grandeco de la an=

taúe riceveblaj ekzempleroj . La prezo , kompare al ĉiuj aliaj ofertoj , estas relative malalta : la peco kostas S 4.--. Vi povas mendi ekzemplerojn kun broĉo, pinglo aú por la butontruo.

Informservo, informtabuloj. En n-ro V/VI de AER ni alvokis la austriajn ges-anojn kun la peto , anonci sian pretecon, transpreni la funkcion de informanto por la informtabuloj, fiksotaj en ĉiuj fervojstacioj kaj poŝt= oficejoj, kie trovas sin informpretaj E-istoj. NI RIPE= TAS LA ALVOKON, konsiderante la eminentan signifon de tiu atingaĵo de niaj fakgrupoj fervojista kaj poŝtista por nia movado kaj la turismo en nia lando . Niaj akti = vaj ges-anoj anoncu sin do urĝe al la E-Centro.

"Malantaú la kulisoj okazas multo ! Eventuale vi trovas la titolon de ĉi tiu artikolo iom stranga , sed tamen ne regas ia dubo , ke ĝi estas motivebla ! Se ni ĵetas rigardon malantaú la kulisojn de SEF , ni povas konstati, ke ties estraranoj energie forĝas planojn por konduki nian lingvon al pli brila pozicio. Sekve ne estas loko por plendo pri foresto de iniciatemo flanke de niaj ĉefoj. Sed la demando estas , ĉu ni mem faras multon por realigi la konsilojn, proponojn kaj instigojn , kiujn la estraro disponigas al ni. Kiom valoras planado kaj inici= atemo , se ne trovigas subteno kaj helpemo de tiuj ,kiuj simile al la estraro estas instigataj de "morala" devo, labori por realigi la belan celon?" - Al tio la redakcio permesas al si aldiri, ke la organizo jes estas SEF kaj ne AEF, do,ke ne temas pri preseraro. Tamen ŝajnas al ni, ke la verkinto de tiuj supraj linioj en "Svenska Esperan= to-Tidningen La Espero" estus povinta skribi ilin ankaú por nia kara AEF.

El la estrarkunsido de AEF de 13.8.52 :Kasraporto : stato 1.6. = S 1.173.29, kotizoj = 1.777.50,subvencio de Arbeiterkammer 3.000.-, donacoj por insignoj = 202.- = entute enspezoj de S 6.152.79. Elspezoj : 500 insignoj, div. elsp. ĉefkunveno,vojaĝkostoj s-ano Cech (monumento-Wörgl), lukontrakto Neutorgasse,stampiloj (nova Centro), transporto (6 x aútoveturo) , funkciigo nova telefono, anonco E-Werk (S 700 partpage), anonco Gaswerk, kui rilo, ligno por fakbretaro, vitrino, pupitro, 2 kurtenpendiloj kaj div. kurtenoj, balailo, spegulo, leterkesteto, pur=

igiloj, socialaj pagoj (3 monatoj), salajroj kaj kompen=soj VI/VII, telefonluo VI-VIII,luo kaj purigo de Centre=jo VI-VIII, afranko VI/VII = S 5.589.34 ; saldo 13.8.52: S 563.45.

Atentu, grave ! La estraro de AEF en sia kunsido de 13.8. decidis, alvoki la membraron de AEF, organizi laú=eble ekde mezo de septembro E S P E R A N T O - S E M = A J N O N ! La AEF-landestroj kaj kun ili la grupestroj bonvolu realigi helpe de la ges-anoj efikan kampanjon por nia lingvo per ekspozicioj (ev. en negocejaj vitrinoj), varbparoladoj, porkursa propagando , gazetartikoloj ktp. kaj raporti pri tiuj entreprenoj al la E-Centro !

Oficialaj informoj de la Akademio de Esperanto, n-ro 19-julio 1952. Oficialigo de la sufikso -end . Post pri=studo kaj voĉdonado la Akademio decidis oficialigi la sufikson -end! kun la difino : "kiu devas esti -ata pro materia aú morala trudo ; kiun oni estas devigata -i". - Elektoj por la Akademio. En 1952 okazos elektoj kaj re=balotoj por 19 postenoj en la Akademio . Laú artikolo 8 de la Statuto kandidatoj povas esti proponataj de ĉiu E-ista organizaĵo kaj de ĉiu unuopa E-isto , kiu ankaú povas proponi sin mem . Eventualajn proponojn oni bv. sendi al la adreso de la Akademio de E., Oostduinlaan 32, Hago, Nederlando, antaú la fino de septembro 1952.

A Ú S T R I A E S P E R A N T O - K R O N I K O

VIENO: Viena Esperanto-Delegitaro okazigis la 2.7. en la nova E-Centro sian unuan kunsidon post la jarkunveno de AEF . Estis diskutataj la decidoj de la jarkunveno kaj la kursaranĝoj en la nova agperiodo. En la kunsido de 1'6.8., kiun ĉeestis delegitoj de 10 gru=poj, oni decidis pri la aranĝo de la 5a Viena Esperanto-tago . La konferenco okazos je la 19.10., 14 h , en la restoracio sur Kahlenberg.

La Vienaj E-grupoj estas petataj, alsendi aktualajn raportojn pri la stato de siaj grupoj kun membrolisto (nomaro kaj adresaro). La VED-kunsidoj okazas ĉiam la lan merkredon de la monato (3.9., 1.10., 5.11. kaj 3.12.) je 18.30 h en la AEF-Centro. Ĉiu grupo delegu ĉiam 2 aú minimume 1 grupanon al la kunsidoj,kiuj raportu kaj pre=

zentu proponojn kaj la zorgojn de la grupo . Informu la VED pri viaj kursoj , por ke ĝi ricevu superrigardon pri la instrua aktiveco de la gruparo.

Estas proponite,aranĝi en ĉiu Viena distrikto "Konversacian Rondon" (propono de s-ano Gschanes),kiu kunvenu unufoje dum la monato en restoracio aŭ kafejo.Ĝi atentigu la publikon pri la uzo de nia lingvo . Kiu deziras aranĝi aŭ partopreni rondon tian , tiu bv. sin anonci al VED (E-Centro) kaj indiku adreson de la kunvenejo kaj la tagon de la kunveno.

Plue : La ges-anoj estas alvokataj, porti ekde nun ĉiam la Esperanto-stelon (po peco S 4.- en la E-Centro). S-ano d-ro Grimme proponis , ke la agjaro 1952/53 estu deklarita "jaro de la Esperanto-stelo" , konforme al la propono de s-ano mag. Höfert al la ĉijara 37a Univ.Kongr. de E. en Oslo.

INTERNACIA ESPERANTO-MUZEO. Dimanĉe, la 17.8.,estis malfermata la "Konstanta E-Ekspozicio de IEMW". S-ro dir. kort. kons. S t e i n e r invitas la E-istaron, viziti la ekspozicion , kiu estas alirebla lunde , merkrede kaj vendrede inter la 10a kaj 15a h. Gvidadoj kun varbaj paroladoj estas ĉiam eblaj . Oni telefonu pro interkonsento pri la vizito al la muzeo (R 27-9-44).

Okaze de la 25a datreveno de la fondo de IEMW la Viena E-Delegitaro kaj la Estraro de AEF per jeno esprimas al s-ano Hugo Steiner kaj al la muzea estraro siajn korajn gratulojn kun la danko pri la oferoriĉa laboro por la mondgrava E-instituco.

La eldona societo "Buchklub" aperigos en sia revuo por lernantoj "Wir und die Welt" E-artikolojn . En la 3a parto de la cocieta almanako por 1952 aperos informa artikolo pri nia movado , kiun ni dankas al la sukcesiga helpo de AEF-vicprezidanto , s-ano min. kons. d-ro Führing , direktoro de la Ŝtata Ekzamenkomisiono por E. La artikolojn verkis s-ano Gschanes, sekretario de la Societo de Aŭstriaj E-Instruistoj.

Direktoro Hans Jakob en Vieno.La multjara direktoro de UEA kaj nuntempa redaktoro de ties revuo "Esperanto", s-ano Hans Jakob, estis komisiita,reprezenti la centran E-organizon ĉe la inaŭguro de la Zamenhof-monumento en Wörgl. Li uzis tiun okazon por viziti Vienon kaj parolis

la 23.7.en la festsalono de la ĝenerala poŝtdirekcio antaŭ la Viena E-istaro. Li donis interesan superrigardon super la nunan staton de la internacia lingvo kaj ties movado. Post la parolado akazis diskuto.Ni dankas al nia eminenta s-ano pro liaj kuraĝigaj vortoj. R.C.

"Konversacia Rondo", kiun estras nia estimata s-ano majoro Oskar Sinner , okazigas siajn kunvenojn ĉiun 2an ĵaŭdon de la monato je 19.30 h en kafejo Wunderer , Hadikgasse ĉe Hietzingerbrücke. Ges-anoj,vi estas ĉiam kore bonvenaj!(En antaŭa AER ni malĝuste anoncis la kunventagon, bv. do atenti la nunan indikon. Pardonon! - red.)

Nekrologo. En Vieno mortis la 4.7.nia de ĉiuj estimata,ĉiam oferpreta s-anino Luise Z i w u t s c h k a . La entombigan ceremonion ĉeestis reprezentantoj de la Aústria E-Instituto, de la AKLE-grupo Vieno, Soc. de aŭstr. E-Instruistoj kaj Danubio. Por nia federacio kaj la Viena s-anaro parolis adiaŭajn kaj dankajn vortojn s-ano Cech . Nia forpasinta samideanino estis unu el tiuj vere modelaj homoj, kiuj, modestaj kaj fidelaj , dediĉis sian spiritan vivon al la altaj idealoj de la mondo. Ni restos kore ligitaj al ŝi.

SALZBURG:Flugis en nian poŝtujon "Estonteco" n-ro 3,Mitteilungsblatt der E-Bewegung der Erzdiözese Salzburg,organo, kiu interligas la Rom-pilgrimintojn en ilia hejmurbo kaj konigas al tiuj personoj la altajn moralajn kvalitojn kaj praktikajn avantaĝojn de E. N-ro 3 enhavas inter alio longan artikolon , kiu lerte argumentas por nia afero . N-ro 2 de la informilo estis redaktata tute en E. Ni dankas al s-ano Domchorvikar Josef Kaps , Salzburg, Kapitelplatz 2/I , ĉe kiu la periodaĵo estas mendebla, pro la modela aktivado !

MALSUPRA AÙSTRIO: Hohenberg. La tiea E-grupo kaj la AEF-landestraro por Malsupra Aústrio aranĝos dimanĉon , la 5.10. en la ĉarma urbeto Hohenberg la 5an Malsupro-Aústrian E-Tagon. Malsupra-Aústrianoj , partoprenu ĝin multnombre por persone kontakti kaj priparoli. la komunajn E-aferojn kaj pasigi agrablan tagon en amika societo! La Vienaj E-istoj tien veturos per speciala aŭtobuso. Anonco pri partopreno ĝis 15.9. nepre necesa !

(E-Centro, R 33-3-64). Detaloj sekvos.

La AEF-landestro Johann Schwarz, Felixdorf, Bräun = lichgasse 12 , per monataj cirkuleroj interligas sin kun la ge-Esperantistoj de sia teritorio . Detalajn sciigojn sendu al li, kontaktu kun li pri viaj problemoj!

SUPRA AUSTRIO: S-ano Karl Nigl , Linz a/Donau, Prinz Eu= genstr. 11 , ne evitas la penon de regula eldono de sia interligilo "La Spegulo". Meritigu vin pri lia penado,atentante ekde nun lian apelon pri partopreno al la redaktado per alsendo de grupraportoj kaj ceteraj movadajoj! En la julia n-ro li skribis : "Ĝis nun eĉ ne unu ĝojiga vorteto trafis nin. Ĉu vi eble pripensis , ke tia sintenado de la grupoj malentuziasmigas la funkciul= ojn de la landa organizo ? Certe ankaŭ ni havus tre ne= cesajn laborojn, fruktodonajn kaj certe amuzajn , kiujn ni preferus al la laboro por tute indiferenta anaro ..."

STIRIO: Esperanto konstruis ponton de Afriko al Aústrio. Antaŭ nelonge stiriaj E-istoj povis saluti raran gaston: s-anon P Carrou , el Libreville , franclanda Kongo. La ekzotika vizitanto ebligis al la AEF-landestr= aro efikan propagandon. Radio-Graz disaŭdigis la 26. 4. en la sendo "Eĥo de la tempo" perfekte sukcesintan inter= vjuon en E. pri la vojaĝimpresoj de nia amiko el la nigra kontinento. Krome la Graz-a ĵurnalo "Neue Zeit" aperigis interesan intervjuon kun bildo de nia simpatia , juna s-ano. "Unueco", grupo en Graz, dum kelkaj ĝrupvesperoj povis ĝui lian ĉeeston. Tri tagojn la s-ano gastis en la E-grupo Knittelfeld. Intertempe nun jam venis liaj sa= lutoj el Venecio kaj Cannes.

El Graz venas raporto pri la ĉijara Ĝeneral-kunveno de "Unueco". Prezidantiĝis s-ano Josef Eder , la stiria AEF - viclandestro . Vicprezidanto estis elektata prof. d-ro Willi Frick. Al la eksiĝinta prezidanto , s-ano Po= drepschek, la kunveno esprimis sian dankon pri lia plur= jara, aktiva kunlaboro.Adreso de la prezidanto:Stattegg-Eichberg 72, P. Graz-St.Veit.

Knittelfeld:La E-societo "Verda Stelo" (s-ano Tho= mas Zuber, Landschach 4) la 29.6. aranĝis ekskurson al Kalwang,kie la juna samsocietanino,f-ino Helene Kalten =

egger afable gastigis la ekskursantojn.

Agrable surprizis nin la apero de la 1a n-ro de la "V o k o e l S t i r i o" ,dumonata organo de la E-landestraro kaj la E-societoj en Stirio (VIII/IX).Enkon=duka artikolo de s-ano d-ro Halbedl kaj artikolo de s-ano Josef Eder montras la konscian poresperantan batalspiriton de niaj stiriaj Esperantogvidantoj kaj ni prave rajtas esperi , ke ilia organo portos fortan stimulon tra la Verda Stirio. Gratulon pro la kuraĝa entrepreno!

TIROLO: Wörgl. Komisiite de la nova AEF-estraro la afer=gvidanta vicprezidanto,s-ano ofickonsilisto Cech transdonis en ĉeesto de nia tirola landestro s-ano Hans Steiner al la urbestro de Wörgl, s-ro komerca konsilisto Martin Pichler,leteron de la AEF-estraro kun dankesprimo pri la akcelado de la klopodoj de nia s-ano Hans Steiner por la starigo de la unua Zamenhof-monumento en Aústrio.

S-ro urbestro informis pri la multaj malfacilaĵoj, kiuj komence ŝajnis malebligi la efektiviĝon de la gran=dioza plano .de s-ano Steiner . La loko , elektita kiel starejo por la monumento , estas bonsitua kaj ĝi nepre altiros la atenton de ĉiu persono, kiu iros al aú de la stacidomo.

Innsbruck: Okaze de la vizito de la AEF-afergvid=anto la E-klubo aranĝis lunde, la 23.6. specialan klub=kunvenon . Ĉeestis 20 personoj el Innsbruck , ankaú d-ro Karner, la SAT-ĉefperanto por Aústrio el Stams,la s-anoj Otto Steiner, E-klubestro el Wattens, kaj Peter Auer, E-klubestro el Brixen i. T. Partoprenis la kunvenon ankaú la nestoro de la Innsbruck-a s-anaro, s-ano Bauer , kiu, 82jarulo , nuntempe plenumas la funkcion de klubkasisto. Post salutvortoj de la klubestro s-ano Richter kaj de s-ano Stöckl sinjoro Cech faris koncizan raporton pri la agado de nia AEF kaj invitis la tirolan E-istaron al plua persista kunlaboro en la kadro de nia federacio. En la sekvinta diskutado s-ano Cech informis sin pri la aktiv=eco de la Innsbruck-aj E-istoj kaj povis doni diversajn. klarigojn kaj sugestojn por la estonta kunagado.

La E-klubo Innsbruck regule aranĝas monatajn estr=arkunsidojn.Kiel delegitoj por la "Aústria E-Servo" est=is elektitaj s-anoj Martin Stöckl kaj Franz Mitterberger.

Oni decidis,akiri la inform-tabulojn por la Innsbruck-aj stacidomoj. Je la 13.6. okazis agrabla ekskurso al Tul= ferer -kabano ĉe Solbad Hall, partoprenis 17 personoj;je 22.6. oni ekskursis al la lagoj de Rheintal, en akompano de ges-anoj el Hall,Wattens, Schwaz, Wörgl kaj Kufstein. S-ano stud. fil. Ölberg faris la ŝtatan E-ekzamenon por instru-kapableco kun sukceso. - La modelan raporton pri la jarkunveno de la klubo,kiu okazis je la 4.4. kaj est= is datita de 1'8.5., la redakcio nur ekposedis la 25. 6. Ĝi montras la viglan agadon de la grupo sub lerta gvid= ado . La ĉefagado en la pasinta jaro rotaciis ĉirkaú la AEF-kongreso . Ĝi havis atentindan propagandan efikon. Notinda estas la sukcesa agado por la praktika apliko de E. helpe al fremdlandaj E-istoj.

NATURAMIKA FAKGRUPO

"La Migranto" n-ro 2, la 16paĝa, belpresita, klišo= hava eldonaĵo de TANEF,oficiala ligilo de la E-istaj na= turamikoj,aperis.Por ĝia eldono la naturamika centro do= nis subvencion de 800 S . Tiu ĉi ankaú presis por TANEF leterpaperon kaj kovertojn. "La Migranto" estas akirebla ankaú en la E-Centro je prezo de S 2.50.

Okaze de la "Viena Naturamika Tago", okazonta di= manĉe, la 21.9. ĉe Wallbergerhütte sur Roppersberg ĉe Laab am Walde , nia Naturamika Fakgrupo aranĝas E-istan renkonton. Partoprenontoj kunvenu laú malnova devizo "je la 9a en Mauer" (finhaltejo); gvidos s-ano Finkenzeller. Wallbergerhütte estas ankaú atingebla per trajno - Kurz = zug de Hütteldorf ĝis Tullnerbach, aú aútobuse de Vieno-Schillerplatz (6.15,7.30 h) aú de Mauer (7.20,7.40,8.00, 8.40,12.20,13.20 h) ĝis Laab am W.Partoprenu multnombre!

SOCIALISTA ESPERANTISTARO

Subvencion de 1000 S de la Socialista Partio ricevis la socialista junulara grupo "Amikeco"por starigo de pro= paganda tendo dum la internacia junulara renkonto "IUSY-Camp 1.-10.7.1952 en Vieno (Hörndlwald). Estas la unua fojo,ke la Socialista Partio donis subvencion por la pro= pagando de E.Des pli alte ni taksas tiun financan helpon kaj ni publike esprimas al la organizo Vieno de la Socia= lista Partio nian plej koran dankon . Pri la tre sukcesa

agado de niaj gek-doj en IUSY-Camp aperos en la septembra n-ro de AER detala raporto.- Dum la fakkunveno de la so= cialista sekcio de AEF okaze de la ĵarkunveno de la fede= racio k-do A.Berdan raportis pri la ĝisnuna agado kaj pri ricevo de subvencio de S 2000 de la Sindikata Ligo.La E-grupo "Naturamikoj" invitis la soc. E-istojn al aranĝado de komunaj kunvenoj.K-do Glüxmann submetis al la kunveno rezolucion, kiu precize determinis la pozitivan pozicion de la soc. E-istoj al AEF (aperos en AER 9/52 - red.).Ĝi estis unuanime akceptata. - La 24. 6. okazis kunveno en Naturfreundehaus kun la E-naturamikoj. Post raporto de estro Berdan pri la celo de la komunaj kunvenoj estis dis= kutata nia estonta laboro. Prefera tasko estas, gajni la intereson de la partio , sindikatoj kaj aliaj soc.organ= izoj por E. - A T E N T U ! Ĉiun 4an mardon en la monato precize je 19a h la socialistaj kaj naturamikaj E-istoj kunvenas en la hejmo de la Naturamikoj, 15.,Diefenbach= gasse 36, 3a etaĝo. (proksima kunveno: 23.9,!)Notu tion bone! Venu certe kaj precize!Socialistaj gastoj bonvenaj!

KATOLIKA ESPERANTISTA VIVO

Leteradreso : W. Mudrak, Vieno 3.,Beatrixg.19/9.

Ni atentigas ankoraŭfoje pri la aranĝo de la katol. E-istoj dum Tutaŭstria Katolika Kongreso (Gesamtösterr. Katholikentag) : Vendrede 12.9., 15-17 h: Renkonto en la Internacia E-Muzeo, I.,Hofburg, Batthyanystiege, 4a eta= ĝo; sabate, 13.9., 10 h: Diservo (S.Meso kun E-prediko) en preĝejo je Sta Elizabet (Deutschordenskirche) I.,Sin= gerstr.7. Samtage tuj poste, je 11.15, Festkunveno en Thomas-Salonego, Vieno I., Postgasse 4a. (Ev.ŝanĝoj eb= laj). Laŭeble poste komuna tagmanĝo kaj interamika kun= esto, laŭ interkonsento laborkunsido. Niaj aranĝoj estos entenataj de la oficiala programo de Katholikentag.-- Kursfinfesto, okazinta 24.6., kunigis 30 ges-anojn. La 8 restintaj kaj fervoraj kursaninoj prezentis legaĵojn, poemetojn,kantojn kaj efikan sceneton en E. Ili ricevis kiel kvazaŭan "ateston" pri la frekvento de la kurso foton de Zamenhof. - Speciale respektan admiron meritis kaj de ĉiuj ĉeestintoj ricevis la ampleksa prediko de P. koman= doro G. P l a n k , farita en la kadro de la programo de l'nunjara AEF-ĉefkunveno en Christkönigskirche. La pre=

diko memorigis pri la pasinta Pentekosto kaj montris la efikon de la Sankta Spirito en la eklezio tra la jarcentoj. Tiu spirito de amo ja ankaŭ nin E-istojn instigu kaj gvidu! Al nia estimata P. Plank estu esprimata nia sincera danko !

W.M.

Komunikoj de la redakcio.

Post multaj klopodaj la estraro de AEF trovis presejon, kies laborkvalito kaj prezoj šajnas pravigi la esperon, ke ekde nun nia revuo povos aperi regule monate, en la amplekso de minimume 8 paĝoj. Tiamaniere ni esperas ebla povos kontentigi la deziron de nia membraro pri pli ofta kontaktado kun la E-Centro per la monata organo. En la septembra n-ro de AER ni iom pli detale parolos al niaj legantoj pri kelkaj problemoj kaj tiurilataj solvoproponoj.

Materialon por la septembra n-ro de AER bonvolu sendi tuj al la redaktoro, s-ano Hugo Kraus, Vieno XIV. Hitteldorferstrasse 255/11.

la redakcio.

-- o O o ---

Ciujn librojn, Esperantajn kaj germanlingvajn, mendu nur ze "TRAMONDO", Vieno XV., Fünfhausgasse 16 !

Eigentümer und Herausgeber: Österr.Esperantistenverband. Verlag: "Tramondo". - Verantwortlicher Redakteur : Hugo Kraus , sämtliche W i e n XV., Fünfhausgasse Nr.16 Druck: Offset Vervielfältigung,ADRESSEN-SUPPAN,Wien IV., Brucknerstrasse 2, U 41-2-70